


EKE



esperanto

**Kunveno: merkredon la 20an de junio 2018a
je la 20.00 h. en “De Uitwijk”,
Generaal Pattonlaan 124, Eindhoven.
tel. 040-2450590.**

***Nia* revuo “Esperanto”**

Jeannette prezentos la programon.

Ĉiun monaton la membroj de U.E.A. ricevas la revuon “esperanto”. Iuj membroj klopodas legi ĝin de kovrilo al kovrilo. Aliaj ricevantoj elektas nur kelkajn el la artikoloj, laŭ propra deziro. Laŭdire ĝi enhavas aktualan, interesan kaj inspiran bildon pri la agado kaj strategio de U.E.A. por la evoluo de Esperanto en monda skalo.

Ĉu vi ricevas la revuon? Ĉu vi legas ĉiun artikolon aŭ ĉu vi elektas el la enhavo?



En nia junia kunveno ni nun faru nian propran revuon, tial Jeannette kunportos multajn revuojn, paperon, tondilojn, kaj gluon. El la numeroj haveblaj ni ĉiuj elektu la plej interesajn artikolojn por fari kvazaŭ antologion de la revuo.

EKLABORU!